

# ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo. Esperantista (I.K.U.E.) fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj administracio: Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht). Nederlando. Ĵarabono f 4.50 aŭ samvaloro.

Kunlaborantoj: d-ro E. J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo) Ludwig Thalmaier, Sac. (Germanujo.) J. Vernoux, sac. (Francujo) Eusebio Maynar (Hispanujo), Prof. H. G. Wannemakers S. J., G. Ellerman kaj d-ro W. J. A. Manders (Nederlando), d-ro W. Solzbacher (Usono).

## ĈIELENIRA KANTO.

*Faru aplaŭdon, kaj ĝojegu, vi, Kristanaro!  
Vidu ĉielen veturi sur sia triumfa ĉaro,  
Kiu malsupreniris en tombon post tiom da honto,  
Nun tamen kun gloro ekprenos la plej altan tronon.*

*Vi, supreniru, Filo de Dio kaj homo!  
Forlasu la krucon, lancon, kaj dornokronon,  
Kaj genton malbonan, kiu kolerokule vidanta,  
Senintelekte Vin kraciis en la Vizagon sanktan.*

*Malfermu por ni Viajn ĝojriĉajn domojn,  
Kaj faru la vojon al vivo por Adamidaj homoj,  
Malfermu al ni denove la Paradizon fermitan,  
Kaj beatigu nin per Via Nomo laŭdita.*

*Ĉefsacerdoto, kiu senmortulo sin montris,  
Kaj verŝis Vian sangon pro la pekoj de l'mondo,  
Supreniru, en la ĥoron sanktegan,  
Antaŭestu per Viaj meritoj la Dion severan.*

*Ho, Kiu estas oleita de Dio, Reĝo!  
Rigardu Vian Eklezion, Fianĉinon, el la ĉiela seĝo,  
kiu, alie nek konsolon, nek kapon konas, kaj restas  
disigita;  
Sendu al Ĝi la Spiriton kaj Ringon edziĝan, longe  
promesitan.*

*Joost van den Vendel. (1587-1679)  
(Princo de la nederlandaj poetoj)*

trad. H. G. Wannemakers S. J.

## ESPERANTO EN LA NEDERLANDA PARLAMENTO

El ricevitaj leteroj ni scias, ke la decido de la nederlanda parlamento ne meti la instruadon de Esperanto en la leĝoj pri la elementaj lernejoj elvokis reakciojn en aliaj landoj. Pro tio ŝajnas al mi necese komentarii iomete la decidon. Kontraŭe al diversaj sistemoj en multaj landoj, en Nederlando la instruado en la elementaj lernejoj (ankaŭ en aliaj lernejoj) estas tre precize reguligita en tutlanda leĝo. La programoj kaj hortabeloj estas por ĉiuj lernejoj preskaŭ konformaj unu al la alia. Dum la lasta jarcento, sub la liberalaj devizoj: 'Scio estas povo' kaj 'Scio estas virto', la programo eĉ de la plej elementaj lernejoj estis superŝargita. Nuntempe oni klopodas plisimpligi la programon. Tial oni ĝenerale ne ŝatas meti Esperanton en la programon de la elementaj lernejoj (por infanoj de 6-12 jaraĝaj.) Dua motivo estas ke nuntempe mankas la instruistoj por la ĝenerala instruado de Esperanto, do la faktoj devigus ne plenumi la leĝajn ordonojn. Kaj trie la afero havas internacian karakteron. Se aliaj landoj ne faras samajn decidojn la instruado de Esperanto estus senefika. Ĝis nun en aliaj landoj oni instruas Esperanton nur en kelkaj lernejoj. En Nederlando ankaŭ. Laŭ tiu vidpunkto la afero eĉ ne atingis la stadion de esplorado, kvankam en Nederlando ĝis nun la leĝo malhelpas seriozan esploron. La unuflanka decido de la nederlanda parlamento povus havi tro akrajn reperkuciojn en aliaj landoj, kiuj eĉ ne servus al la kristanismo. Krom tio la afero nun atingis la stadion de serioza esploro pere de Unesko, kaj nuntempe ne estis la ĝusta tempo por tia decido.

El la voĉdonado oni ne povas konkludi ke 37 nederlandaj parlamentanoj estas por Esperanto, ĉar ni scias ke diversaj socialistoj, komunistoj kaj liberaluloj estas kontraŭ Esperanto, same kiel diversaj kristanaj parlamentanoj estas por Esperanto. Oni ne akceptis la projekton en kristanaj partioj nur sur politikaj, pedagogiaj kaj oportunismaj motivoj.

Kaj kial la socialista partio celadis al voĉdono, ĉar ĝi antaŭe sciis ke ne estas plejmulto por la projekto? Tamen ni bedaŭras la decidon. La afero estis pritraktata en 2 tagoj, nome je ~~vendredo~~ kaj mardo. (Dum la interaj tagoj la parlamento ne kunvenas!) Do ne ekzistis tempo por influigi la parlamenton al kompromiso, ekz. ebligi la instruadon al specialaj lernejoj, por ke serioza esploro de la afero estu ebla.

Sincere ni devas diri ke la afero tiel finis pro netaŭga agado de diversaj esperantistoj mem. Kelkajn tagojn poste ni renkontis denove tian agadon sur alia tereno. Nin atingis letero de granda esperantista asocio en Nederlando propagandante ke la esperantistoj nur subtenos tiun kandidaton al la komunuma estraro, kiu celados al la enkonduko de esperanto en la programo de la elementaj lernejoj. Kiel granda ĉarlatanaĵo! La komunuma estraro ja havas nian influon sur tiu tereno! Per tiu agado oni nur atingas ke politikistoj (kiuj finfine devos decidi pri ĉi atingo de niaj celoj!) primokante rigardas la esperantistojn kaj . . . Esperanton!

Nia afero estu en taŭgaj, seriozaj kaj se eble en influricaj manoj!

J.

### LIBRO - ELEKTSERVO

(estro: p. J.F. Smeehuyzen s.c.j.)

(Daŭrigo de la librelektilo 1950)

KAMEMORO - Mary kaj Sulo - B, V, 83.8 : 86

LINDBOM, Tage - Sveda laborista movado - Johansson, Martin - A, IV, S, 3

LU SIN - Elektitaj noveloj - (pluraj) - A, IV, 83.8

MOLIÈRE - Edziĝo kontraŭvola - Dufreutel, V. - A, II, 82

NILSSON, Otto A. - Stenografio laŭ la sistemo de Melin - B, V, 653

NITTI, Fr. Sav. - Eŭropo ĉe la abismo - Kreuz, R. - A, III?, L, 32

NOTHNAGEL, Prof. Dr. Herm. - La mortado - Selzer, Bernh. - A, III, N, 61

PREŠERN, Dro. Francé - Bapto ĉe Savica - Vahen, Damjan - A/D, IV, +, 81 :  
83.1 : 087

# VOJA ĜIMPRESOJ EL USONO

*Post la milito diversaj fakuloj povis fari studvojaĝo al Usono en la kadro de la Reciproka Sekura Pakto (Mutual Security Act M.S.A. la antaŭa Marshall-helpo.). Antaŭ ni kuŝas raporto de fakulo, kaj la enhavon ni opinias taŭga al pli vasta diskonigo, ĉar la raportoj restas tro ofte nur en la manoj de la fakuloj. La raportisto vizitis dum kelkaj tagoj la universitaton de Madison, ĉefurbo de la ŝtato Wisconsin.*

Kvankam la Universitato de Madison havas ĉiajn fakultatojn, kiuj estas vizitaj de 16.000 studentoj, la agraria fakultato estas la specialaĵo. Pro tio ĝi havas grandan famon.

En Eŭropo, kiel diras prof. o William Clark, estas granda distanco inter kio la profesoroj scias kaj kion la farmistoj komprenas. Tie oni parolas pri la 'Herr Professor' - 'Lia eminenta Doktoro' - 'Lia moŝta Profesoro', ktp. kiuj situas sur alta turo interne de la scienca bastiono, sed kiuj tro malofte diskonigas siajn konon kaj sciencan al la farmistoj en lingvo kiun tiuj simplaj homoj povas kompreni. Kaj, li daŭrigas, estas tamen la tuta popolo, kiu ebligis al li kolekti sian konon kaj sciencan; li havas la plej grandan obligon helpi al la simpla popolo.

## **Servo al la popolo.**

Sur la dorsflanko de gvidiloj de tri universitatoj, kiujn ni vizitis, la prezidanto de tiuj institutoj skribis bonvensaluton. Li sin direktas ne nur al la studentoj, sed ankaŭ tre speciale al ĉiuj enloĝantoj de la ŝtato. Ni legas: 'La Universitato estas posedaĵo de ĉiuj ŝtatanoj. Ĝi estas do plene al via servo'.

'Servo al la popolo', tio estas la baza filozofio de la Universitato de Wisconsin, de la ŝtata Kolegio de Michigan, de la Cornell Universitato kaj de pluraj centoj aliaj institutoj. Estas tie normala afero, ke ekz. simpla farmisto vizitas la universitaton por preparoli kun profesoro aŭ iu el la asessoroj la problemojn rilate sian farmon.

Inter la Universitatoj kaj la simpla popolo estas frekventa kontakto. Ĝi ne staras flanke de la popolo kiel ne alproksimiĝebla bastiono de scienco, sed ĝi staras meze en la popolo. 'Bonveno en nia Universitato'.

La frekventa kontakto estas stimulata, ne nur de la proprainformservo, sed pere de multnombraj kursoj, kiujn la Universitato aranĝas ĉiujare por instruistoj, bankistoj, ĵurnalistoj, fabrikantoj, ĉefoj, farmistoj, ktp., ktp.

En prospekto mi legas, ke de Novembro ĝis Marto en Madison estas kursoj por farmistoj. Tiuj nomataj 'mallongaj farmkursoj' daŭras dekkvin, dek aŭ kvin semajnojn, kaj centoj da junaj farmistoj sekvas ilin. Oni multe uzas ankaŭ la institucion de aŭskultantoj dum la kolegioj. Dum nia vizito al la Universitato de East-Lansing en Michigan, kie 'nur' 8000 studentoj estas registritaj, ni loĝis en la Kellogg Centro, laŭdire unu el la plej modernaj hoteloj de Usono, sed la atako al nia posedo de dolaroj estis tre limigita. En ĉi tiu hotelo, kiu situas sur la terenoj de la Universitato, kaj kiu estas donaco de la 'Malto-kaj grenmagnato' Kellogg, multnombraj kursoj kaj konferencoj okazas. En 1951 pli ol 125.000 personoj vizitis la centron. Kaj tie oni estas dorlotata, ĉar la Centro samtempe estas edukinstituto por proksimaj estroj de hoteloj kaj restoracioj!

## **Usona universitato estas sensacio!**

En Eŭropo oni ofte iomete primokas la universitatan edukon de Usono. Tamen tio estas maljusta, ĉar oni ne rigardas la diferencon inter la malsupera parto de la universitato, kiu estas daŭrigo de la mezlernejo, kaj la supera parto, la gradiga studado.

Ĉiukaze la teknikaj institutoj de la Universitatoj forte impresas.

Ili estas vere amerikanaj. Grandaj kaj ultramoderne meblitaj konstruaĵoj, magnifikaj kaj bone ekipitaj laboratorioj kaj koleĝsalonoj.

Sur la mapo de la Universitato de Madison ni nombras 150 konstruaĵojn, escepte la malgrandajn. En la Babcock-halo staras moderna kaj kompleta laktaĵ-fabriko. Vera esplorlaborejo. De sur galerio oni povas supervidi ĉion malantaŭ la vitraj muroj. La lakto por la laborejo venas el propraj farmoj, kiujn ni

vizitis. Neniam mi vidis lakton ĉirkaŭata de tiom da zorgoj, kiel ĉi tie. 'Sen homa tuŝo', ek de la mamoj ĝis en la kartonan aŭ botelan enpakadon, ĉio per maŝinoj.

La tuta tereno kun la parkoj havas surfacon de pluraj centoj de hektaroj kaj situas ĉirkaŭ la Lago de Mendota. Estas paradizo, kie oni ŝatas resti la 'eterna studanto'. Estas tie ekz. granda artefika glacidomo por glitiri, stadio kun sidlokoj por 60.000 personoj. Futbalo estas grava afero en la Universitata vivo en Usono. Ankaŭ finance. Laŭ onidiroj la Ann Arbour-Universitato, kiu havas stadion por 90.000 vizitantoj, enkasigis en unu jaro unu milionon da dolaroj, kaj la Katolika Universitato de Nia Sinjorino estus financinta sian pligrandigon per la enspezoj de sportaĵoj. Kaj ne forgesu la Union, la studentan sociejon. En tiu granda konstruaĵo kun longeco de 100 metroj kaj alta je 5 etaĝoj sin trovas teatro, moderne ekipita kun 1300 sidlokoj, malgranda teatro, granda kinosalono kaj magnifika dancsalono. En la bilardsalono staras 30 bilardoj, ĉiuj en tre bonaj kondiĉoj. Estas 8 keglejoj kaj kelkaj kafetarioj (restoracioj kie oni servas sin mem), en kiuj oni provizas ĉiutage 10.500 manĝojn. Plie estas muzik- kaj ekspozicisalonoj, kaj grandega biblioteko kun amuza literaturo.

Aliaj universitatoj estas simile aranĝitaj.

Ŝajnas ke la Usona studanto estas tre disciplinema. Oni povus manĝi de la planko

La plejmulto de la studentaro loĝas en dormdomoj, kie oni luas sid-dormĉambron. La dormdomoj por knaboj kaj knabinoj estas apartaj, kaj ili estas sub intensa kontrolo de la Universitato. La virinaj studentoj ĝis 25-aĝaj devas esti hejme antaŭ la 23a h. Laŭ komunikaĵoj de diverslandaj studentoj la morala sinteno estas bona kaj oni laboras intense.

#### **Pri vivnivelo kaj salajroj.**

Unu el la plej fortaj impresoj de Usono estas la tre alta vivnivelo de la popolo kompare kun eŭropa landoj. Je ĉiu  $4\frac{1}{2}$  enloĝanto, inkluzive grizuloj kaj infanetoj, estas unu aŭtomobilo. Ĉiu laboristo iras per aŭtomobilo al la deĵoro. Proksimume 67% el la urba loĝantaro posedas frostejon, 52% elektran lavilon, 91% radioricevilon, ofte kun kombino al gramafono, kaj 2 el 3 familioj havas telefonon. Pli ol la duono de ĉiuj amerikanoj, kiuj vivas de salajroj, havas propran domon kaj el ĉiuj 5 amerikaj familioj 4 havas viv-asekuron de 6000 dolaroj meze.

Laŭ la statistikoj la enspezo de la farmistoj estus 49,1% de tiu de la urbanoj, sed ankaŭ en la kamparo la nomitaj diferencoj ne estas multe pli malaltaj. (La vivkostoj kaj la vivnivelo de la farmistoj ĉie en la mondo ankoraŭ estas miriga miraklo por la ekonomiaj statistikistoj!)

La amerikaj laboristoj estas duraj laboremuloj, sed ili gajnas bone. Jen kelkaj salajroj: stablo-laboranto 1,80-2 dolaroj en horo; instrumentfaranto 3-4 dolaroj; cementisto 3-3,50 dolaroj; stukisto 2,80-3 dolaroj kaj masonisto 3-4 dolaroj. Li laboras 40 horojn en semajno. Tamen per lia salaĵo li povas aĉeti pli multe da varoj. Por unu dolaro oni povas aĉeti:

9 funtoj da sukero, aŭ 1 funto da kafeo, aŭ 6 uncoj da teo, aŭ 25-30 ovoj aŭ  $1\frac{1}{2}$  funto da margarino, aŭ 1 funto da butero, aŭ 6 funtoj da blanka pano, aŭ 5 litroj da lakto.

Amerika laboristo laboras: 7 minutoj por unu funto da pano; 8 minutoj por unu funto da rizo;  $4\frac{1}{2}$  minutoj por unu funto da sukero; 35 minutoj por unu funto da kafo; 26 minutoj por dekduo da ovoj. En 3 ĝis 4 tagoj li perlaboras sufiĉe por bona kostumo, aŭ por bona radioricevilo kaj per la salaĵo de unu tago li povas donaci al sia fianĉino 12 parojnda nilonŝtrumpoj.

Usono ne konas mankon al help-kaj bazaj materialoj. La tero enhavas memezureblajn riĉaĵojn. Usono estas la plej granda produktanto de fermineralo, kupro, plumbo kaj stano, la dua en arĝento kaj la tria en oro. Ĝi estas la plej granda liveranto de karbono en la mondo kaj 60% de la mondproduktado de oleo fluas el amerikaj fontoj. Sed tio ne povas esti la klarigo ke Usono kun 6% de la mondpopolo havas la duonon de la mondindustrio. Ekzistas aliaj landoj kun ne malpli da riĉaĵoj en sia tero, sed kie dentbroso ne estas konata aŭ ŝajnas granda luksaĵo. La klarigon por la alta vivnivelo oni devas serĉi en la eficienco de la produkt-kaj vendaparato, en la raciaj labormetodoj, en la ekstreme ĝisfunda mekanikigo kaj specialigo kaj sekve de tio en la tre granda laborproduktado. Kaj finfine en la laboremo kaj entreprenemo de la loĝantaro. La amerikano laboras dure kaj la dolaroj ne venas propra-move al li.

(Laŭ raporto de N.C.R.)

N E D E R L A N D A  K A T O L I K O

NEDERLANDSE ROOMS-KATHOLIEKE ESPERANTISTENBOND

OPGERICHT 29 AUGUSTUS 1909

Voorzitter: L.G.C. de Jong, Utrechtseweg 81, VLEUTEN  
 Secretaresse: f-ino T.Durenkamp, Kasperspad 91, DORDRECHT  
 Penningmeester: H.F.Roobeek, Krugerlaan 195, GOUDA  
 Postrekening: 121449 ten name van "Nederlanda Katoliko"  
 Geestelijk Adviseur: mons-ro H.J.A.M.Eras, te VUGHT

---

**B O N V E N O N E N H A G O !**

La dato de nia jarkunveno alproksimiĝas. POR DIO KAJ EKLEZIO, la haga sekcio de NOKO ĝojas, ke ĝi povos akcepti la NoKo geanojn el Nederlando. Jam nun ĝi tutkore bonvenigas la gastojn kaj faros sian eblon gastigi ilinkiel ebleplej bone.

Kiel vi povis legi en la februara numero de NoKo ni intencis ne aranĝi fest-vesperon. Je insista peto de la ĉefestraro kaj la sekcio Alkmaar ni cedis kaj oferos al vi vesperon kun festa karaktero.

La organizo de tiu vespero estos io nova. En ĝi kunlaboros tre verŝajne du NoKo sekcioj, t. e. ALKMAAR kaj HAGO. Du-ope ili faros sian eblon aranĝi programon laŭ ĉies plaĉo.

Post la fermo de tiu programo ni (ankaŭ io nova) agreble kunestos dum kelka tempo. Tiam ĉiuj havos la okazon renovigi amikajn rilatojn kaj fari novajn geamikojn. Kompreneble ankaŭ estos la okazo fari dancon, sed ne unualoke. Kvankam la programo de festvespero estas publikigata antaŭ la SANKTA MESO, vi komprenu bone, ke la MESO fakte estas la ĉefa programero. En tiu SANKTA MESO RELIGIAJ KONSILANTOJ, ESTRARO kaj GEANOJ petegos la Dian Benon por sia laboro en la Romkatolika Esperantista Ligo. La kapelo estu tro malgranda. KAPLANO THOMAS celebros la Sanktan Meson kaj faros la predikon, kompreneble en Esperanto. Kaj fine je tiu sama DIMANĈO okazos la jarkunveno. Kiel eble plejmultaj sekcioj sendu siajn delegitojn por preparoli la interesojn de nia movado. Per la kunlaboro de ĉiuj nia jarkunveno sendube sukcesos. Ke tio religiŭ sincere deziras la tuta haga sekcio POR DIO KAJ EKLEZIO.

K. J. Vernooij, prezidanto.

**JAARVERGADERING NEDERLANDA KATOLIKO TE DEN HAAG**

**Zaterdag 30 Mei 1953**

20.00 uur: **Feestavond** in café-restaurant, 'DIE HAGHE', PAPESTRAAT 32, aan geboden door de afdeling DEN HAAG, met medewerking van de afdeling ALKMAAR.

Degenen, die in Den Haag willen overnachten bij medeleden of in hotels (Prijs f 4.50 - f 6.00) gelieven zich vóór 15 Mei a. s. op te geven bij Mevr. A. HUBREGTSE, Lange Lombardstraat 25 DEN HAAG.

**Zondag 31 Mei 1953:**

10.00 uur H. Mis in de kapel aan de LAAN.

De H. Mis wordt gecelebreerd door Kapelaan THOMAS uit LEIDEN, die ook de predicatie houdt in ESPERANTO.

11.00 uur: AANVANG van de JAARVERGADERING in Café-Restaurant DIE HAGHE, Papestraat 32.

---



13. 15 uur: KOFFIETAFEL (f 2.25) per persoon). Men wordt verzocht zich hiervoor tijdig op te geven aan bovenstaand adres, Lange Lombardstraat, Den Haag, indien enigszins mogelijk vóór 24 Mei a.s.

14. 30 uur: TWEDE GEDEELTE van de Jaarvergadering.

17. 00 uur: SLUITING.

Als er voldoende liefhebbers zijn (minstens 20) bestaat de mogelijkheid om op Zaterdagmiddag per autobus een rondrit door DEN HAAG en SCHEVENINGEN te maken. De kosten hiervoor zullen plm. f 2.50 p.p. bedragen. Om aan deze tocht deel te nemen, moet men zorgen uiterlijk om 15.00 uur in DEN HAAG te zijn. Op-gaven hiervoor vóór 15 Mei a.s. eveneens aan de Lange Lombardstraat 25, waar-na plaats een uur van vertrek nader zullen worden bekendgemaakt. Ook kan de miniatuurstad 'MADURODAM' worden bezocht. Tijdens de feestavond en de jaar-vergadering zullen er ansichtkaarten met tekst in Esperanto worden verkocht. Dit op verzoek van enkele bezoekers van de jaarvergadering te Alkmaar. Het programma van de feestavond zal aan de zaal worden verstrekt.

## Jarraporto de la sekretariino de Nederlanda Katoliko

Denove tralegante mian jarraporton, kiu aperis en la N.K.-komunikiloj de A-prilo 1952, mi kun malĝojo konstatas, ke mi kun sama efiko povus preterlasi la kompilon de tia raporto, ĉar miaj tiamaj diversaj proponoj kaj instigoj tute ne trovis eĥon ĉe niaj membroj, tiel ke naskiĝas la suspekto, ke multaj, membroj ne legas tiujn raportojn kaj la resto supozas ke la enhavo nur rilatas al aliuloj! Do mi limigas min dirante, ke la alfluo de petoj por informoj pri Esperanto konstante daŭrigas; anoncis sin multaj novaj membroj, tamen eĉ pli multaj malnovaj anoj eksigis, tiel ke nun ni havas 251 sekciajn, 149 individuajn membrojn kaj 46 donacantojn, entute 446. Antaŭ jaro tiuj ciferoj estis respektive 281, 165, 40 468. Mi nur povas instigi ĉiujn, fari sian e-blon por ke baldaŭ tiu hontiga perdo estu kompencita.

Al la sekciaj sekretarioj mi denove petegas, ĉiam tuj anonci eventualajn ŝanĝojn; okazas ke ni ricevas informon ke ceteraj membroj eksigis antaŭ diversaj monatoj, aŭ eĉ antaŭ jaro; en tiu tempo ili ne pagis kotizon, dum ni tamen regule sendis niajn revuojn. Nia kaso, kiu pro la malalta kotizo daŭre estas preskaŭ malplena, certe ne povas toleri tiajn perdojn.

Niaj individuaj membroj ankaŭ pripensu, ke ili ŝuldas la kotizon ĝis la oficiala anonco de eksigo: ne resendu 2-3 foje la kvitancon dum vi regule ricevas niajn revuojn, ĝis nia ĝenerale tre paciencas kasisto estas devigata eksigi vin pro nepago. Tia konduto ruinigas nian unuigon kaj cetero tute ne

## FINANCIEEL OVERZICHT 1952

	begroting 1952		Kas 1952		Balans 31-12-51		Balans
	Ink.	Uitg.	Ink.	Uitg.	Deb.	Cred.	Deb.
Saldo Kas			29.04				
Saldo Giro			218.19				
Contrib.	1600.00		1654.40		90.00	44.00	93.00
N. C. K. E.		12.00		12.00		12.00	
Bur. E. b. Ond.		20.00		20.00			
Ex. Comm.		15.00		0.00			
Verg.		150.00		176.95			
Dag. B.		200.00		185.86			
Org. N. K.		210.00		136.00			
Esp. Kat.		1200.00	1) 1201.75			528.88	
Div.		40.23	122.58	63.58			
Schr. C.					200.00		200.00
Saldo Kas	29.04			6.91	29.04		6.91
Saldo Giro	218.19			221.16	218.19		221.16
Reserve						2403.34	2) 0.00
Libro-Servo			814.05	814.05	2585.76	134.77	2502.28
	1847.23	1847.23	2838.26	2838.26	3122.99	3122.99	3023.35

estas honesta.

Ĉiujn bonvolemajn N.K.-anojn ni alvokas por varbi novajn membrojn. Estas vere ke oni povas uzi Esperanton ne estante ano de iu unuiĝo, sed la Esperanto-ligoj ankoraŭ estas necesaj ĝis la fina venko de nia lingvo. Do provisoreni bezonas idealistojn kiuj fortigas niajn rangojn!

LA SEKRETARIINO.

## JUNULARO.

Raporto pri la jaro 1952a.

En 1952a la agado inter la katolika junularo de Nederlando ne progresis tiom, kiom ni esperis. Dum la du antaŭaj jaroj ni faris diversajn kontaktojn, kiuj esperigis nin, ke baldaŭ estos vigla Esperanto-movado inter la Nederlanda katolika junularo. La jaro 1952a malfortigis tiun esperon: Ni perdis du kunlaborantojn, aŭdis pri malfondigo de tri kursoj kaj gajnis nur unu kunlaboranton kun unu kurso. El la junulaj gazetoj, en kiuj ni havis Esperanto-rubrikon, restis nur du: DE ENGELBEWAARDER kaj DE GOUDEN WIEK. Malgraŭ tio la junularo daŭre montris sian intereson por Esperanto. Por la oficiala statistiko ni povis noti la aliĝon de 106 personoj: 107 knaboj kun 7 gvidantoj kaj 49 knabinoj kun 3 gvidantinoj. Preskaŭ 100 geknaboj kaj 2 plenkreskuloj petis informojn pro niaj rubrikoj en suprenomitaj gazetoj.

Konkludoj el la raporto.

Malĝojiga konkludo: Ni perdis terenon en kelkaj lokoj pro laciĝo aŭ malobstino de kunlaborantoj. Ĝojiga konkludo: La junularo montras abundon da intereso, kiun intereson ni bedaŭrinde ne povis sufiĉe celtrafe kontentigi. Konkludo pri la rezultatoj: Rubrikoj en junulgazetoj estas fruktedonaj; por atingi firman rezultaton ni bezonas multe pli da kunlaborantoj.

Helpkrioj

El la junularo ni devos formi le estontan Esperantistaron; tial la agado inter la junularo estas grava afero, kiu meritas ĉies helpon. Ni ne petas monon, nek de la ligo, nek de vi mem. Sed ni urĝe petas obstinan konlaboron de via klubo kaj de ĉiu ano. La kluboj elektu unu al siaj anoj por speciale trakti junulajn aferojn N.K.-anoj en lokoj, kie ne estas klubo, anoncu sin mem kiel kunlaboranton. Ne pensu ke tri aŭ dek personoj povas Esperantigi la centmilojn da katolikaj geknaboj. El tiuj centmiloj ni povus certe gajni kelkajn milojn por Esperanto, se nur ĉiu Esperantisto helpus.

Helpu do, helpu, jes, ankaŭ vi! La reprezentanto por la junularo de N.K. estas

L. Weijts, Fabianusstraat 45, Apeldoorn.

## NEDERLANDA KATOLIKO

31-12-52	Jaarrekening 52		Begroting 53		
Cred.	Verlies	Winst	Ink.	Uitg.	
			6.91		
			221.16		
84.50		1616.90	1800.00		1) Aflossing L.S. f 100.00
12.--	12.--			12.--	2) Voorraad boeken f 2188.28
	20.--			20.--	
15.00	15.00			15.00	3) Activa L.S. 1.3.53
10.00	186.95			150.00	f 2350.99
	185.86			150.00	
34.00	170.00			170.00	H. F. Roobeek,
593.38	1266.25			1400.00	penningm.
	41.00			111.07	Gecontroleerd en in orde bevonden
		128.87			Gouda, 7-3-52 J. D. M. Cornelissen
2274.47		151.29			J. Moll
					W. Chr. van Eijk
3023.35	1897.06	1897.06	2028.07	2028.07	

# AGENDA VAN DE JAARVERGADERING

1. Opening.
  2. Mededelingen.
  3. Notulen vorige vergadering.
  4. Jaarverslag secretaresse en bestuursbeleid.
  5. Jaarverslag penningmeester 1952 en Begroting 1953. Behandeling van de financiële voorstellen.
  6. Bestuursverkiezing. Aftredend de heren H.F. Roobeek en K. Vernooy. Beiden stellen zich herkiesbaar. In de vacature van de heer S. Nijhuis zijn als kandidaten gesteld mej. S. Simonis te Rotterdam en de heer W.J.H. Derks te Heythuizen (L).
  7. Causerie door de Zeereerw. Pater H.G. Wannemakers S.J. over 'Onze tegenwoordige taak in de Esperanto-beweging'. Discussie.
  8. Behandeling ingekomen voorstellen (zie N.K. van Maart jl.)
  9. Rondvraag.
  10. Sluiting.
- De individuele leden worden vertegenwoordigd door de heren: H. de Kuyer te Oud-Vossemeer en G. van Dijk te Laren. (N-H).

## Lourdes-reis

Het aantal deelnemers is wel zodanig, dat de reis kan doorgaan. Het was echter mooier als een grotere bus kon worden gevuld. Daardoor zouden we nog meer kunnen bieden. Het is ook mogelijk, dat niet-leden aan de reis deelnemen. Wie dus onder zijn kennissen liefhebbers kan vinden, spore hen aan van onze gelegenheid gebruik te maken. De reissom (logies en maaltijden inbegrepen) bedraagt f 250.--. Aanmeldingen en inlichtingen ten spoedigste aan: L.G.C. de Jong, Utr.weg 81 te Vleuten. (Voor reisroute zie N.K. Maart j.l.)

## BIBLIOGRAFIO

G.J. Degenkamp - La Konsilanto pri la Esperanta Gramatiko, 2e geheel herziene druk. Nadat de eerste druk van 1933 direct na de oorlog geheel was uitverkocht, heeft de schrijver het werkje geheel omgewerkt, daarbij rekening houdend met de evolutie van Esperanto en de ruimere opvatting omtrent de grammatica. Daardoor is de vertaling van verschillende uitdrukkingen soepeler geworden, niet meer geketend aan de vroegere, rigoureuze opvattingen van: 'beslist zo moet het zijn en anders is het fout'; de samensteller baseert zich op diverse factoren in het taalgebruik, als logica, nationale invloeden en vooral gevoelswaarde van het woord, waardoor meerdere, gelijkwaardige vertalingen mogelijk zijn. Het boek bevat een schat van raadgevingen bij taalmoelijkheden en wij kunnen het warm aanbevelen aan allen, die wat dieper op de Esperanto-grammatica willen ingaan; ook voor cursusleiders is het een praktische en bijna onmisbare vraagbaak. De uitgave is keurig verzorgd: klare druk op hagelwit papier, gecartonneerd, en verkrijgbaar af f 2.75 bij onze Libro-Servo.

T. D.

### Verkrijgbaar bij de Libro-Servo

Dr. Dominicus	De Waarde van Esperanto	f 0.30
Brochure:	Esperanto, de Wereldhulptaal	0.03
de Bruin:	Gvidilo tra la Esperanto-Movado, met suppl.	0.95
Buis:	De Esperanto literatuur in Vogelvlucht	0.60
Buis & Faulh.	Hoe kan ik het in Esperanto zeggen?	0.25
H. Bulthuis	Esperanto leerboek, 2 dl. geill. p. deel	0.95
Degenkamp	La Konsilanto, schat van gram. raadgevingen gekart.	2.75
Degenkamp	De Voorzetsels, met toepassingen, gekart.	1.50
Degenkamp	Eigennamen in Esperanto	0.35
Degenkamp	Leidraad bij de studie van Esp. Literatuur (ex. B.)	0.45
Faulhaber	Gebonden Stijl, over poezie in Esp.	0.35
Faulhaber	Honderd vragen over gram. en onderwijs (ex. B.)	0.35
Faulhaber	Tra la Labirinto de la Gramatiko, gebonden	5.90
Isbrucker	Examen-opgaven A en B met vertalingen	1.25
Zondervan & Dr. Manders	Esperanto leerboek v. kweeksch. gymn. enz.	2.50

+ portokosten

Betaling direct na ontvangst van de boeken aan mej. T. Durenkamp, Kasperspad 91, Dordrecht, postrekening 214009.



## Katolika eldono de la Biblio en Esperanto I

Pri ĉi tiu temo jam dum multaj jaroj ĉiam denove parolas la deziro de la katolikaj esperantistoj. Kaj prave pro diversaj kialoj.

La Biblio ja estas la plej grava dokumento de la katolika Eklezio, de la tuta Kristanaro, eĉ de la tuta homaro. Se estas nia intenco eldoni la ĉefverkojn de la homaro en Esperanto, unualoke staras inter tiuj la Sankta Skribo. Bona traduko de la Biblio do estas grava pliriĉigo de la literaturo en Esperanto.

Ĉiuj nekatolikoj certe atentigos pri la jam ekzistanta traduko. Ĉar Zamenhof mem ĝin faris de la Malnova Testamento en klasika lingvo, kaj J.C. Rust, anglikana pastro, esperantigis la Novan Testamenton. Ĝuste por ni, katolikoj, tio estas nova argumento por eldono, kiu el nia propra vidpunkto estas farita!

Ĉar ni havas niajn proprajn dezirojn rilate al tia traduko. Por garantii ke la teksto estas fidela, ĝi estu aprobita de la eklezia aŭtoritato, alie la legado estas malpermesata. Ĝi krome enhavu klarigajn notojn, ĉar la tekste ofte supozas leganton, kiu scias en kiu religia kaj kultura situacio la rakonto okazas.

Ni krome menciuj, ke la Zamenhofa eldono estas nekompleta! Mankas la sekvan-taj libroj: Tobias, Judit, Saĝeco, Ekleziastiko, La profetaĵo de Baruh, la Letero de Jeremia, I kaj II Mahabeoj; kaj kelkaj malgrandaj partoj el aliaj libroj.

Sekvas tria argumento: La Biblio estas libro nepre leginda. Dio mem estas ĝia unua verkinto. Tiu traduko do ne estu unue esperanta monumento, eĉ foje misuzota kiel propagandilo; male ĝi estu monumento de Dio mem, kiun ni ĉiam plenrespekte tralegos kaj donos al aliaj por legado.

Kvara argumento sekvas el la unua. Pro la graveco de la Biblio ĝi estas la fonto fruktiganta la tutan literaturon religian kaj profanan, krome la religian elokventecon. Por ĉi tiuj terenoj oni do nepre bezonas fidindan tradukon de la Biblio por ke la tekstoj akiru ĝustan, konstantan kaj konatan formon. Ni nur pripensu la laboron de nia I.K.I., kiu ĉiutage praktike montras tiun necesecon. Ne eblas ĉiufoje kompari la ekzistantan neaprobitan tradukon kun la aprobita teksto en gepatra au origina lingvoj. Ĉiuj ĉi kvar argumentoj ĉiam valoras kaj ne dependas de la nuna disvastiĝo de Esperanto. Oni nur povas jesi, ke ju pli nia movado kreskas, des pli urĝa fariĝas la katolika eldono de la Biblio.

Se ĝi ankoraŭ ne ekzistas, tio estas pro gravaj malhelpoj, kiujn ni en sek-vanta artikolo indikos.

H. G. Wannemakers S. J.

### *Nigraj anĝeloj*

La historio de la poeziaĵo kiu sekvas estas jena: Paro da geedzoj en Afriko havis belan infaneton el grandaj kaj dolĉaj okuloj. Sed, ho ve! malĝojan tagon la etulo mortis kaj al la patrino ankoraŭ indolana kaj plendoploro la edzo, penante konsoli sin, nur kapablis diri ke la bubeto estas en ĉielo, ĝi estas anĝelo. - Sed ĉirkaŭ viaj Madonoj mi neniam vidis anĝelojn nigrajn, mi vidis nur blankajn - diris la virino. Tuisita de tiaj vortoj, la viro kvankam nek lerta poeto nek muzikisto, kunmetis la delikatan lirikon kiun ni transkribas, kaj muzikis ĝin. La nigra poeto supozas paroli al iu pentristo kiu pentras Madonon sur la funda vando de preĝejo, malantaŭ la altaro.

*Lerta pentristo mi vin alparolas,  
dum altaron pentrorname vi volas.  
Mi estas malriĉa nigrulo,  
elaŭdu peton de tiu mizerulo.*

*Se vi pentras per la mano pia  
ne malŝatu je koloro la nia;  
kun plezuro ridetos la Sinjoro  
vidante anĝelon el nigra koloro!*

*Ne rifuzu pentri anĝeleton  
nigre koloran, ankaŭ nigruleton  
akceptas en ĉiel' la Dipatrino,  
eĉ se blanka estas la Virgino.*

*Mi estas nur malriĉa nigrulo  
sed de l' Sinjoro bona fidelulo  
kaj scias ke Li estas amanta  
ankaŭ de ĉiu nigrul' suferanta.*

*Bildon de nigra anĝelo bela  
pentru, vin petas kredanto malhelo,  
post la kandeloj lumigantaj  
meze de l' ĉefanĝeloj preĝantaj.*

*mallerte tradukis ALER*

*(el Crociata Missionaria)*

Laŭ iniciato de la Popol-Altlernejo de Zürich (Svislando) estas aranĝataj en la popol-Universitatoj de pluraj urboj en Eŭropo paralelaj Esperanto-kursoj, kun la celo, ke la partoprenantoj jam post la kvara leciono komencu internacian korespondadon kaj poste faru reciprokajn vizitojn, por akceli la internacian amikiĝon kaj la mondpacon. Tiaj kursoj okazos dum la vintra sezono 1952/53 en Amsterdam, Bruselo, Florenco, Hago, Kopenhago, Manĉestro, Parizo, Strasburgo, Stuttgart kaj Zürich kaj eventuale aliaj, urboj (La Praktiko).

Kelkaj membroj jam instigis al ni organizi ion similan por katolikaj kursoj. Se eble ni volas doni informojn al la kursgvidantoj.

\* \* \*

En Newark N. J. (Usono) nia membro d-ro George A. Maggio estas tre aktiva. Li instruas du kursojn - unu por komencantoj en kiu partoprenas kuracistoj el la Newark-areo, kaj unu kiel daŭrigo de lia sukcesa kurso pasintjare Partoprenas kuracistoj, flegistinoj, fratulinoj kaj membroj de la loka Klubo de Leonoj. En somera eldono de la Bulteno de la Medicina Asocio en konteo Essex aperis letero pri Esperanto, skribita de d-ro Maggio.

\* \* \*

Kaŭze de instrukcio de la itala ministro de edukado momente centoj da geinstruistoj sur la insulo Sicilio partoprenas Esperanto-kurson.

\* \* \*

La Sveda Kooperacia Federacio, kiu posedas diversajn fabrikojn kaj 8.000 butikojn, eldonis broŝuron en Esperanto pri sia historio, sia organisacio, kaj la nuntempa stato.

\* \* \*

La ministro de internaj aferoj en la germana ŝtato Hessen permesis ke policistoj, kiuj scipovas paroli Esperanton, portu sur la maniko insignon kun la vorto "Esperanto".

\* \* \*

La Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA raportas ke la kunlaboranto s-ro Pierluigi Marelli ellaboris tre dokumentitan studon pri la problemo de teknikaj vortaroj. La kunlaboranto d-ro O. Reiersol, docento en la universitato de Oslo, traducis la problemon pri la publikigo de sciencaj artikoloj en Esperanto. La kunlaboranto d-ro M. Wajsblum kompilis ampleksan studon pri la nuna stato de interlingvistiko kaj detalan raporton pri la Esperantaj libroj en Index Translationum, kiun nun eldonas UNESKO. Kunlaboranto s-ro W. Auld finis la bibliografion pri la Esperantlingvaj publikajoj en la jaro 1952.

\* \* \*

La XIVa Hispana Esperanto Kongreso okazos en Bilbao de 7-10 Aŭgusto 1953

\* \* \*

La 37a Brita Esperanto Kongreso okazos je Pentekosto 22-25 Majo venonta en Bournemouth.

\* \* \*

La 25a kongreso de Italaj Esperantistoj okazos de 5-9 Septembro 1953 en Como. Aperis nova kolorilustrita faldfolio kaj gvidlibreto pri Como kaj la ĉirkaŭaĵoj. Ĝi estas havebla ĉe: Ente Provinciale per il Turismo, Piazza Cacciatori delle Alpi, Como (Italujo). Ni rekomendas peti ĝin.

\* \* \*

Episkopo d-ro Josef Kóstner de Gurk-Klagenfurt apartenas al la Protektora Komitato de la Aŭstria Esperanto-Kongreso okazonta en Klagenfurt de la 22-25 Julio venonta.

\* \* \*

#### ' INFORMOJ DE INT. ESPERANTO - MUZEO, WIEN ( IEMW )

En julio 1953 ni deziras eldoni Adresliston de la vivantaj VETERANOJ, do de gesanoj esperantigintaj antaŭ 1914. Veteranoj sendu al IEMW tuj viajn foteton, vivokuron K. adreson. Ni transdonos la listojn al la Honorsekr. de VEK (Veterana E.-Klubo) s-ano LEWIN, 33 Kingscroft Ave, DUNSTABLE, Britujo, kiu kontraŭ 4 resp. kup. ankaŭ sendos la VEK-insignon. La eldonota Adreslisto kostas 2 resp. kup., sendotaj al IEMW. Jam 200 sin anoncis. Aneco al VEK senpaga. La Muzeo metos la nomojn k. la fotojn sur tabuloj en niĉon de la PANTEONO de IEMW poreterne! - INFORMILO DE IEMW, ankaŭ organo de VEK,

4-foje po jaro kun interesa enhavo, kostas 6 resp. kup. kaj per tiu pago vi estos por 1953 sen plua pago SUBTENANTA MEMBRO de IEMW kaj ricevos membrokarton. - Niaj KOLEKTOJ, proks. 10.000 eroj, estas instalataj en 5 salonegoj de HOFBURG (iama imperiestra kastelo) meze de Wien. KATALOGO en preparo, poste ankaŭ acetebila. Sendu al IEMW Librojn ktp. kaj monan obolon. Monon por la Muzeo anstataŭ resp. kup. vi povas pagi al HEROLDO DE ESPERANTO, nome unu kaj duonan leterafrankon eksterlanden po respondkupono Kore via Hugo Steiner, fondinto-prez. de

Internacia Esperanto Muzeo  
Wien, 1., Hofburg, Austrio

## NIA XXIVa

AFIŜO kun arta bildo estas eldonita en Francujo. Ĝi celas propagandi en la preĝejoj por Esperanto kaj por la Lourdes-pilgrimo. Eksterlanden oni povas sendi ekzemplerojn sen teksto. Ĉiu povas skribi aŭ presigi la tekston en la bezonata lingvo. Dimensio: 37 x 50 cm. prezo: 4 rkp. Oni povas mendi al la informejo de la kongres-pilgrimo en Parizo: "Esperanto" 41 rue Descartes, PARIS 5. (Francujo).

KARAVANO: La Parizaj partoprenontoj vojaĝos kune el Parizo per vagonaro. Alilandanoj povas aliĝi al la karavano.

FERVOJRABATO: La partoprenontoj al la Pilgrim-Kongreso en Lourdes rajtos je 20% rabato ek de la landlimo al Lourdes aŭ al Parizo. Kiuj vojaĝos kune el Parizo havos pli grandan rabaton. Kongresanoj, kiuj veturas pli ol 2500 km. per vagonaro en Francujo, estos eblaj akiri turistan bileton (individan) kun rabato de 30%.


NOMBRO da PARTOPRENONTOJ: Francujo 19, Nederlando 14, Germanujo 9, Hispanujo 5, Aŭstrujo 3, Italujo 3, Irlando 2, Belgujo 2, Usono 2, Anglujo 1, Saarlando 1, Entute 61 (ĝis 20/4/53).

KOTIZO: Ni atentigas ke de post 1-V-53 validas la bazan kotizon de 1100 frs.

## Lourdes kaj Esperanto

Pli ol ĉiuj aliaj, Francoj devas konservi pie, ĉe la korfundo, kulton al "VIRGINO MARIA". Jen, per kelkaj linioj, la tialo: Ĵurpromeso de reĝo LUDOVIKO XIII, en 1638, por ŜIA Ŝirm-protektado al Francnacio. Li ja estis konsentinta helpon al Aŭgusten-monaĥoj por starigo de preĝejo kun monaĥejo, ĉe la centro de Parizo, formalkondiĉe, ke ĝi havu nomon "NIA SINJORINO DE LA VENKOJ", pro aludo al venkoj sur la protestantismon. La unuan fondŝtonon LUDOVIKO XIII mem lokis, 9.12.1629, ĝin solene benis Monsinjoro Jean François de Gondi, ĉefepiskopo de Paris. Malrapida estis la konstruado, finita nur en 1740. Intertempe, LUDOVIKO XVI daŭrigis monhelpon aljuĝitan de sia patro al la monaĥoj. Benita en 1666 por la kultpraktikado, la preĝejo estis finkonsekrigita en 1740, al NIA SINJORINO DE LA VENKOJ, kie kaj kia ĝi estas nun (Notinda rimarko: tie, en 1836, naskiĝis la kutimo al "Noktaj Adoradoj", sub la impulso de paroĥestro Desgenettes). Cetere, ASUMPCIO fariĝis NACIA festo en Franclando, ĝis kiam ne plu estis ŝtata le katolika religio. Tamen, la 15-a de Aŭgusto restis kaj ja estas feria tago. Devo ankaŭ estas por ĉiulandaj Katolikaj Esperantistoj, scii -kaj memori-, ke, dum la unua disvastiga periodo de Esperanto, Katolika Medio multe agadis en Franclando. Post apero (kun Imprimatur, kompreneble) en 1893, de PREGARETO POR ESPERANTISTOJ, tr. de Beaufront I-a eldono: en 1902, 2-a eldono; en 1907, de KATOLIKA PREGARO, same tr. de Beaufront; en 1903 E.K. estis fondita de pastro franca Emile Peltier. In 1905, aperis, dediĉita al V-a Universala Kongreso de Barcelona, KATOLIKA KANTIKRETO; en 1908, aperis, tr. de Pastro Peltier laŭ verko de D-ro Boissaries, LANDO DE MIRAKLOJ- Lourdes; en 1911, de Jos. Serre tr. de S-ino Zabilon d'Her, HIPOTEZOJ PRI LOURDES; en 1913, 2-a eldono de KATOLIKA KANTIKARETO, prizorgita de S-ro Claudius Colas. Nia venerata pionir-samideano pastro Peltier tre ŝatis vizit-restado en Lourdes; delonge malsana, li tie mortis, 17.2.1909, kaj, laŭ sia deziro, tie estis enterigata. MARTO 1910. En Parizo, okazis I-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj, dum kiu estis fondita I.K.U.E. (memorinda dato, ĉu ne?) Tuj poste, revis kaj sin okupis kun mirinda aktiveco Claudius COLAS, sekretario de Franca Ligo, pri Pilgrimo al Lourdes. En 1914, dum Majo, ĉio estis jam preta por pilgrimi, 12-18 Aŭgusto: ĉiuj formalajoj plenumitaj, programo oficiale akceptita, esperanta flago pendanta ĉe la baziliko..... SED, I-a Aŭg. eksplodis la I-a Mondmilito, el kiu ne revenis, ve, nia bedaŭrata amiko Colas. Nur en 1932, oni povis denove projekti pri Lourdes' a Pilgrimo. Tion faris prezidanto de I.K.U.E., kataluna pastro Font-Giralt, organizante Pilgrimon, Kongreson en Betharram, Poezi-konkurson kiel "Floraj Ludoj". Dum Kongresmalfermo, li anoncis; IKUE. Ĵus estis favorita de Pariza ĉefepiskopo. L. Eminenca Kardinalo Verdier, Ankoraŭ multaj ĉeestintoj povas memori pri tiamaj okazintaĵoj, speciale afabla akcepto de mons. Gerlier, kiel episkopo de Tarbes. Restas deziri -kaj akiri-grandan sukceson por la baldaŭaj 1953'aj Pilgrimo kaj Kongreso, kiuj ĝuos belegan region-kadron kaj ĉiam emociantan Lourdes' an preĝ-atmosferon.

Cecile Royer



11. s-ro U. Hoffmann - Berlin (Germanujo)  
12. sac. J. Biewer, Darmstadt (Germanujo)

Ni sincere dankas



## KORESPONDADO


Nia unua letervespero okazas meze de Majo venonta. Dudek geklubanoj, aĝo 14-25 jaroj, atendas viajn leterojn kaj poŝtkartojn. - ESPERANTO-Grupo Moyá, Str. Forn. 19 MOYÁ (Barcelona), Hispanujo.

Bonvolu sendi multajn poŝtmarkojn por la Afrikaj Misioj. Sendu, ni petas, al 'Filatela Fako', Seminario de la Blankaj Patroj, KERLOIS HENNEBONT (Morbihan) Francujo.

Post la kurso ni volas korespondi kun geeksterlandanoj pri diversaj temoj.

Esperanto-rondo: Merts, de Wetstraat 13, ZAANDAM (Nederlando)

Gimnaziaj studentoj serĉas korespondantojn! Adresu viajn leterojn al: d-ro W. Manders, Boenerstr. 7, VENLO (Nederlando)



C. Colodi:	Pinokjo, trad. Marchesi,	broŝ. f 1.50	bindf	3.10
Degen:	Esperanto lernolibro por Infanoj, dir. metodo, kolor. bildoj kart.			1.25
Degreef:	La radianta Lotuso			1.25
M. Dekker:	La Mondo ne havas Atendejon, moderna teatraĵo k. belaj fotoj			2.50
Delsudo & Laido:	Aŭstralio, lando kaj popolo, k. multaj grandaj fotoj			2.50
Delsuno:	Formortinta Delsuno, rak. de li mem! hum. Ilustr.			1.25
C. Dickens:	La Batalo de l'Vivo, en tola bindo, ilustr.			1.95
Dr. Dominicus:	De waarde van Esperanto			0.30
V. Dorno:	La Aventuroj de Stultulof			0.55
van Dorp, sac.	Biblio aŭ Instru-aŭtoritato?			1.60
A. Drozdov:	Krucumo (el la rusa revolucio) tras. Hohlov			0.40
x Fr. van Eeden:	La malgranda Johano (trad. H. Bulthuis)			1.20
x Eola:	La Amo en la jaro dekmil, 350 pp.		bind.	2.85
x St. Engholm:	Al Torento, novelo			1.25
Edna Ferber:	Fanny, trad. B. Fabo		tolbind.	3.10
J. Filip sac.	Ĉeĥoslovakaj popolkantoj en Esp. k. muziknotoj il.			2.--
x Forst de Batt.:	La mistero de l'Sango (sciencia)			1.50
W. Fricke:	Universala Legolibro			1.25
Gerstäcker:	La Maro, (el marista vivo) trad. Teo Jung		bind.	2.10
Grignon de Montfort:	La Mistero de Maria, tradfr. Wigbertus van Zon			0.55
Fratoj Grimm:	La Neĝulino k. aliaj Fabeloj, trad. Kabe. grandf. kart.			1.60
v.d. Hagen:	Kie estas la Eklezio de Kristo ?			2.--
Hasse Z.:	Humoroj, trad. Dr. F. Szilagy			2.--
Wilh. Hauff:	La Kantistino, trad. Wuster			0.45
x A. Hekler:	Arthistorio, trad Kalocsay, 146 fotoj, broŝ f 7.--		bd.	8.--
Heroldo:	Mozaiko, div. rakontoj kaj skizoj			0.30